



subneĝa vitejo

# ESPERANTO - PROVENCE

n° 99 - vintro 2014/2015

*Kio taŭgas por somero, ne taŭgas por vintro. (Proverbaro Esperanta – n° 982-1)*

## kvaronjara gazeto de la Provenca Esperanto-Federacio

### federacia retejo

[www.esperanto-provence.org](http://www.esperanto-provence.org)

### nia federacio sur Facebook

[www.facebook.com/  
esperantoprovence](http://www.facebook.com/esperantoprovence)

### prezidanto

Pierre Oliva

2772 Montée du Vieux Camp

83330 Le Castellet

06 76 55 57 23

[nlpolecamp@gmail.com](mailto:nlpolecamp@gmail.com)

### baza kotizo por aliĝo

(kun bulteno) : 6 €

ĉeko al :

"Espéranto PACA"

pere de via loka asocio

aŭ sendota al la

### kasisto

Michel Cerisay

15 Place des Vents provençaux

13140 Miramas

[mcerisay@gmail.com](mailto:mcerisay@gmail.com)

### redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain

61 Montée du Castelar

83460 Taradeau

06 42 19 68 51

[p.vilain83@orange.fr](mailto:p.vilain83@orange.fr)

### limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta n°

**31a de Marto 2015**

bonvolu sendi al la supra retadreso  
antaŭdankojn pro viaj kontribuoj

## Vorto de la Prezidanto

Kaj, sendube,  
ankaŭ ĉiu el vi  
estas Charlie,  
ĉu ne ?



Pacan  
kaj harmonian  
jaron 2015  
al  
la tuta homaro !

*Pierre Oliva*

## Atentu / Attention !

Ne forgesu pagi la aliĝkotizon – 6€ - al *Espéranto-PACA* por la jaro 2015, ĉu pere de via loka asocio, ĉu rekte al nia kasisto, *Michel Cerisay* (aliĝilo aldonita al ĉi-gazeto). Dankon !

*N'oubliez pas de payer la cotisation de 6 € à Espéranto PACA pour l'année 2015, soit par l'intermédiaire de votre groupe local, soit directement à notre trésorier, Michel Cerisay (formulaire d'adhésion joint à ce bulletin). Merci !*

*Ne forgesu tiun ĉi daton !*

## Federacia membro-kunveno

**dimanĉon 8an de Marto - je la 14a30**

**en Les Issambres (Var), Résidence Val d'Esquière**

tie, kie okazos samperiode la Mediteranea Esperanto-Semajno  
(surloka tagmanĝo ebla)

Jen ĉi-poste la diversaj raportoĵoj pri la jaro 2014 kaj, aldonfolioe,  
la kunvokilo kaj voĉdona rajtigilo (en okazo de via neĉeesto)

## Federaciaj raportoĵoj - 2014

### 1 - Morala (Pierre Oliva)

En nia federacio, multaj laboras entuziasme por propagandi Esperanton kaj ĝin instrui, por akcepti eksterlandanojn kaj ankaŭ por provi plibonigi sian lingvo-nivelon. Tutkore mi volas ilin gratuli kaj danki.

La jara membro-kunveno estas grava evento por nia asocio ; ni ja devos pripensi kaj decidi pri tio, kion ni faru por plu kreskigi ĝin dum la venonta jaro.

Des pli, ke ĉijare ni devos anstataŭigi niajn sekretariojn kaj kasiston...

## 2 - Agada (Monique Arnaud)

### Membraro :

La federacio "Espéranto-Provence" havis 62 membrojn je la 31/12/2014.

12 grupoj en la jenaj departementoj kaj urboj :

04 : Manosque kaj Villeneuve ; 05 : Gap ; 13 : La Ciotat, La Roque d'Anthéron, Miramas, Marseille ; 83 : Fréjus-St Raphaël, Le Beausset ; 84 : Avignon, Carpentras, Orange.

Plie, estas membroj de nia federacio, kiuj aniĝis en neniuj lokaj kluboj. (ekzemple, sed la listo verŝajne ne estas kompleta : en Aups, Taradeau, Draguignan, Pignans, Saint-Mandrier (Var) ; en Nice, Contes, Gillettes, Guillaumes (Alpes-Maritimes)...) )

### Administrado :

Membrokunveno okazis en Aix-en-Provence, la 6an de Aprilo, en la Domo de la Naturamikoj.

Elekto de Komitatoj :

Arnaud Monique ; Cerisay Michel ; Demongeot Claudie ; Mimmersheim Franz ; Oliva Pierre ; Spanjaard Thierry ; Triolle Renée ; Vilain Pascal ; Wallez Gilles

prezidanto : Pierre Oliva

vic-prezidanto : neniuj

sekretario : Monique Arnaud

help-sekretario : Claudie Demongeot

kasisto : Michel Cerisay

gazetrespondeculo : Pascal Vilain

rilatoj kun Espéranto-France : Monique Arnaud /Gilles Wallez

### Informado, Komunikado :

La federacio plu eldonas sian trimonatan gazeton :

« Espéranto-Provence ». Unu klubo (Avinjono) eldonas propran bultenon.

La diversaj kluboj partoprenis en multaj neesperantistaj aranĝoj :

- Tago de la Patrino Lingvo: laŭ iniciato de UNESKO, la 21a de Februaro estas dediĉita al la patrinaj lingvoj, la lingvo en kiu ĉiu homo strukturigas sian penson kaj malkovras la mondon.

- Virina Tago la 8an de Marto

- Fine de Februaro, EKEM-04-Esperanto prezentis en Pierrevert la lingvon Esperanto dum unu semajno pere de diversaj dokumentoj kaj afiŝoj. La 27an, la filmo « Esperanto en la mondo » estis montrita kaj sekvita de debato « Kio estas Esperanto ? Kiel ĝi funkcias ? »

- EKEM-04-Esperanto prezentis Esperanton al lernantoj de la lernejo « Lycée Esclangon » en Manosko la 3an de Julio, okaze de renkontiĝo de Klubo de la Solidareco.

- En Embrun la 13an kaj 14an de Septembro okaze de Foiro Génépi.

- Forumo de Asocioj : pluraj kluboj starigis budon en diversaj lokoj : la 6an de Septembro en Fréjus (83) kaj en La Ciotat (13) ; la 7an de Septembro de la 10a ĝis la 17a en Marseille (13 - Parko Borely) ; la 14an de Septembro en Le Beausset (83)

- La Ciotat : dum la jaro aperas regula informo pri la klubo en la gazeto de CIQ, Maison des Associations.

- F. Noireau, kiu regule ĝisdatigis perretajn anoncojn pri Esperanto-kursoj, forlasis nian regionon.

- En CEA – Cadarache, ekspozicio estis videbla meze de Aprilo, de la 7-a ĝis la 11-a, kaj reklama flugfolio pri Esperanto aperis en la entreprena bulteno.

- En Majo okazis Eŭropaj balotoj : Monique Arnaud el Gap estis listestro por la sud-oriento, kaj tiuj balotoj estis okazo informi larĝan publikon per afiŝado en la pli multo el la vilaĝoj kaj urbetoj.

### Instruado kaj ekzamenoj :

La diversaj kluboj organizis regulajn dumjarajn kursojn kaj iniciatajn staĝojn en klubejoj, lernejoj.

- En Marseille, regula semajna kurso (konversacio) en CIRA kaj en La Domo de Asocioj.

- En La Ciotat, regula semajna kurso en CIQ-Fontsainte, je dua nivelo ĉar mankas novuloj.

- La planita intensiva staĝo en La Ciotat la 5an kaj 6an de Oktobro ne okazis pro manko de kandidatoj.

- Kursoj en Manosko la 1an kaj 3an merkredojn de la monato.

- En Aix-en-Provence, en la domo de la Naturamikoj, la 5an de Aprilo, estis tre interesa mateno : pere de peĉakuĉoj estis prezentitaj diversaj temoj : Cirila alfabeto (R.Triolle), Interkonsento pri Transatlantika Partnereco, TAFTA (T.Spanjaard), edziĝfestoj en Vjetnamio (R.M. Quintin).

- Sabaton 14an de Junio : tuttaga staĝo en la Domo de la Asocioj en Manosko.

- Dum la jaro 2014 ne okazis kurso en Gap.

- En Saint-Raphaël, 7 homoj vizitis la kurson, kiu okazas lunde posttagmeze.

- En Septembro, nova kurso malfermiĝis en Draguignan, kun 4 gelernantoj. (kursgvidanto : Jean-Claude Roget)

- La klubo Fréjus-St-Raphaël organizis M.E.S, unu-semajnan staĝon ĉe la marborbo en Les Issambres, en Marto. Partoprenis multaj eksterlandanoj.

- Kursoj en Le Beausset - Centre Saint-Exupéry. : de Septembro 2014 ĝis la fino de Junio 2015, estas regula kurso sabate matene (inter la 9a kaj la 12a) - 1a kaj 2a niveloj.

- Mari-Roza kaj Pascal Vilain gvidis kurson, la 15an kaj 16an de Novembro, en la 26a Eŭropa Rendevuo de Stella-Plage, organizita de la Norfrancia Esperanto-Federacio.
- Semajnfina staĝo la 29an kaj 30 an de Novembro en Le Beausset kun 28 partoprenintoj, 3 kursniveletoj

### **Kulturo kaj aranĝoj, kultura agado kaj prelegvojaĝoj :**

- Festo de la Tri Reĝoj okazis en diversaj lokoj : 83 : Esperanto-Klubo de Fréjus - St-Raphaël, samtempe kun ĝenerala membro-kunveno ; 83 : Le Beausset ; 13 : Espéranto - La Ciotat
- En Majo, la klubo de Fréjus - St-Raphaël organizis renkontiĝon por kuntagmanĝi kaj ĉefe paroligi homojn diversnivele.
- En Les Issambres (Val d'Esquières, la MES-ejo) fine de Junio okazis komuna manĝo kun la klubo « Fréjus - St-Raphaël » por festi la finon de la lerno-jaro.
- Prelegturneo de tri ĉinoj en Provenco : en La Ciotat, Le Beausset kaj en Marseille la 16an/17an de Junio.
- Okaze de la Tago de la Eŭropaj lingvoj, okazis vizito al mezgrada lernejo en Saint-Bonnet (05) Korea instruistino, Anna, parolis pri « Alternativa lernejo en Koreio » okaze de du publikaj prelegoj en La Ciotat kaj Marseille, kaj ŝi vizitis Le Beausset .

- Multaj federacianoj partoprenis en Esperantaj kongresoj, renkontiĝoj (franĉaj kaj eksterlandaj) kaj staĝoj : ses Provencanoj partoprenis en la nacia kongreso en Chambéry, unu en la U.K.-o en Argentino, unu en la itala kongreso en Fai della Paganella kun ankaŭ partopreno en AMO-seminario.
- Zamenhof-Tago en Saint-Raphaël kun trideko da partoprenantoj ; bonega artikolo en la loka gazeto Var-Matin.
- Zamenhof-tago en Avinjono, kun prelego de Patrick Lagrange pri : “La nigraj truoj, ĉu nuna diablo ?”

### **Biblioteko :**

daŭra disponigo al la klubanoj de libroj kaj gazetoj en Esperanto.

### **Venontaj projektoj ; eksteraj rilatoj :**

- Mediteranea Esperanto-Semajno, en les Issambres (83), de la 7a ĝis la 14a de Marto.
- Membrokunveno en les Issambres (83) la 8an de Marto 2015.
- Nacia Kongreso ne okazos pro organizado de la U.K. en Lillo, sed membro-kunveno okazos en Parizo en Majo 2015.

## **3 - Financa (Michel Cerisay)**

compte de résultat - année 2014

<b>libellé</b>	<b>débit</b>	<b>crédit</b>
<b>achats pour les activités</b>	<b>55,20</b>	
<b>achat de matériel</b>	<b>66,00</b>	
<b>publications</b>	<b>175,00</b>	
<b>déplacements</b>	<b>190,10</b>	
<b>frais postaux</b>	<b>283,18</b>	
<b>frais de stages</b>	<b>1552,30</b>	
<b>adhésions</b>		<b>386,00</b>
<b>participations aux stages</b>		<b>1819,30</b>
<b>Espéranto-France</b>		<b>105,00</b>
<b>dons</b>		<b>34,00</b>
<b>totaux</b>	<b>2321,78</b>	<b>2344,30</b>
<b>résultat positif</b>		<b>22,52</b>

## El niaj federaciaj asocioj

### Kiel tradicie, samklubanoj festis la Zamenhof-tagon...

★ en Fréjus - Saint-Raphaël (83)...

#### Les membres du club d'espéranto sous le signe de l'amitié

Comme il est de tradition à la mi-décembre, les membres du club d'espéranto de Fréjus-Saint-Raphaël, rejoints par quelques amis de la région, se sont retrouvés, samedi dernier, près de la plaque « Rue Zamenhof », à Saint-Raphaël, pour rendre hommage à l'initiateur de la langue internationale qu'ils pratiquent avec passion. Avant un repas convivial et une après-midi récréative, les participants, réunis autour de la présidente de l'association locale, Denise Loisel, ont pu écouter quelques mots prononcés par Pascal Vilain, membre du club et rédacteur de la revue « Espéranto-Provence ».



Les membres du club se sont retrouvés en bas de la rue Zamenhof, à Saint-Raphaël, du nom du fondateur de cette langue si facile à apprendre. (Photo DR)

#### Plus que centenaire

Il leur a rappelé qu'en des temps plus sombres, il y a exactement cent ans, en 1914, le congrès universel d'espéranto qui devait se tenir à Paris en présence de la famille Zamenhof avait dû être annulé pour cause de...

Guerre mondiale.

C'est en 1887 que le docteur Zamenhof, médecin polonais, offrit son projet d'une langue mondiale, démocratique et respectueuse de toutes les cultures, dont 93 % des mots sont immédiatement compréhensibles par toute personne connaissant une langue latine.

Depuis, les espérantophones du monde entier continuent de faire vivre leur langue lors de rencontres organisées du niveau local - des cours sont ainsi donnés chaque lundi à Fréjus - jusqu'au niveau international. Du 25 juillet au 1<sup>er</sup> août 2015, le 100<sup>e</sup> congrès mondial réunira d'ailleurs

dans notre pays, à Lille, plus de 3 000 espérantistes venus de tous les continents. Nul doute que le club de Fréjus-Saint-Raphaël y sera bien représenté.

Informations auprès du club local : 04.94.83.06.88 ou 04.94.95.66.18 ou par Internet : esperanto-france.org

en Var-Matin, 22an de Decembro

Sabaton la 13an de Decembro, nia grupo kunvenis ĉe la stratŝildo «Docteur Zamenhof», en Saint-Raphaël, por festi la datrevenon de la naskiĝo de la nialingva iniciatinto.

Ankaŭ venis samideanoj el Nice, Gilette, Taradeau, Draguignan, Aups kaj La Ciotat.

Pascal Vilain rememorigis al la ĉeestantoj pri la celo de nia lingvo kaj la fakto, ke pasis jarcento de post la Pariza kongreso de 1914. (3700 homoj estis atenditaj, sed nur 900 alvenis pro la militdeklaracio, kaj post du diskuthoroj, la kongreso estis ĉesigita.)

Poste, ni iris al la restoracio «Le Cristal», prizorgata de la asocio «CAT-Les Mimosas». Ĉiuj ŝatis la tre agrablan lokon, kun ĝiaj vitraj muroj, la kelnerservadon kaj la diversajn bongustajn manĝaĵojn.

Ni parolis kaj Esperante kaj france (jes ja... bedaŭrinde... !). Kvankam ni devis foriri je la dekseka, ni tamen havis kulturalan momenton kun deklamitaj poemoj, demandoj pri nomoj de grandaj urboj, divenaĵoj, ŝercoj...

Ĉiuj ŝatis la tagon kaj interkonsentis pri rendevuo... en 2015 !

raportis Karmen Segarra

### Une antenne du club de Fréjus - Saint-Raphaël en Dracénie

Depuis le mois de septembre un nouveau cours pour débutants est ouvert à Draguignan.

Il comprend quatre élèves (trois Français et un Croate parlant français). Leur enseignant est Jean-Claude Roget. A l'heure où nous mettons sous presse, ils ont atteint la dixième leçon de la méthode "Jen nia mondo".

Bienvenue à ces nouveaux amis au sein de notre fédération !

info : Jean-Claude R.

★ ... kaj en Avignon (84)

La Zamenhof-festo okazis la dimanĉon 14an de Decembro.

Matene prelegis Patrick Lagrange pri la jena temo : "La nigraj truoj, ĉu nuna diablo ?" Pri tio, la ĉefa afero estas - almenaŭ por mi -, ke se la nigraj truoj estus devintaj endanĝerigi nian teron, de longtempe, ĝi ne plu ekzistus.

Tagmeze, ni manĝis kune kaj posttagmeze, ni ludis skeĉojn, kantis, rakontis historietojn, ktp. En unu el la skeĉoj, kiujn ni ludis ĉi tiun jaron, estis greka statuo, mumio, horloĝo (silentaj roloj) luditaj de la klubanoj. (vidu la suban foton) Ni ludis en granda ĉambro, kiu ne estas teatro, do ni elturniĝis kiel ni povis.

raportis Rose-Marie Quintin



silentaj roloj



Patrick prelegas



tradicia grupfoto





**Nia ĉiujara staĝo  
en la okuloj de unuafaj partoprenantoj**

Ĝi okazis la 29an kaj 30an de Novembro en la tre taŭga "Maison des Frères" en Le Beausset, kie ni disponas pri lernoĉambroj kaj tre komfortaj dormoĉambroj. Denove la sukceso ŝuldiĝas al la organizantoj *Pierre Oliva* kaj *Nicole Lafitte*, des pli, ke *Pierre* kuiris por la tuta grupo, mem zorgis pri menuo, aĉetado, preparado, servado kaj purigado ! Dankegojn al li !

Dankojn ankaŭ al la kursgvidantoj : *Mari-Roza Vilain* pri bazaj komencantoj (homoj, kiuj komencis lerni en Oktobro), *Josée Lafosse* pri konversacio, kaj *Pascal Vilain* pri *Georges Lagrange*, tradukisto, verkisto kaj gramatikisto.



*3a-grada kurso pri Georges Lagrange*

**Jen la intervjuo farita de komencantoj en Marseille.  
Lydia kaj Laurent intervjuas Marc, kiu ĉestis.**

L : Ĉu la staĝo plaĉis al vi ?

M : Jes, la staĝo multe plaĉis al mi. Mi pensas, ke la esperantistoj estas afablaj homoj ; utopiistoj multe plaĉas al mi.

L : Kiom da homoj partoprenis?

M : Estas malfacile diri, mi supozas 40. Estis 3-nivelaj kursoj, la homoj estas diversaj.

L : Ĉu estis junaj homoj aŭ maljunaj ?

M : La homoj estis inter 25 kaj 70-jaraj. Ne venis tre junaj.

L : Ĉu vi opinias, ke vi parolas pli bone Esperanton ?

M : Mi opinias, ke jes sed la progreso estas malrapida. Sed mi havas tempon, ne urĝas.

L : Mi deziras demandi, ĉu vi ne estis tro laca post la kursoj ?

M : Laca mi estis sed ne tre multe. Ni vizitis la turismoficejon de *Le Beausset*.

L : Kial ?

M : Ĉar ni vizitis ekspozicion pri Esperanto, kun libroj ("La eta princo", "Grafo Montekristo", "La krabo kun oraj pinĉiloj").



*la turismoficeja montrofenestro*

(RT : La urbetto *Le Beausset* favoras ; monata ekspozicio majstre preparita de *Pierre Oliva* kaj *Nicole Lafitte* devis temi pri Esperanto en Provenco ; ĝin ilustris pentraĵoj faritaj de *Pierre* kun esperanto-titoloj, paneloj pri vivo de Esperanto en *Le Beausset*, sen forgesi la grandformatajn afiŝojn de *Espéranto-France*. Kaj kvizo, kies respondoj troviĝis en la ekspozicio por la homoj kapablaj legi !)



M: En la staĝejo estas bela ĝardeno, kie eblas ripozi, kun 200-jara pinarbo kaj 300-jara verda kverko.

L : Kio okazis vespere ?

M: Mi revenis hejmen, mi ne dormis tie, sed la aliaj diris, ke la homoj kantis laŭ muziko de "*La Marseillaise*", kiu iĝis " La majonezo". Mi multe aŭdis pri trajnoj ĉar mi manĝis kun viro, kiu laboris en trajnkompanio.

L : Ĉu dum la staĝo vi malsatis ?

M: La estro de la staĝo estas bona kaj granda kuiristo ; la manĝaĵoj estis abundaj... kaj ankaŭ la bona vino el *Bandol* !



*multe da homoj  
en la ekspoziciejo  
de la turismoficejo*

## Pliaj komentoj pri la staĝo en Le Beausset

En Esperanto-Aktiv' n° 53 de Decembro 2014, Flavie Audibert, kiu unuafoje partoprenis en la staĝo, skribis la jenon :

Le stage organisé ce week-end par Espéranto-Provence, et plus particulièrement Pierre Oliva et Nicole Lafitte, s'est déroulé au Beausset deux jours durant dans une ambiance studieuse. La trentaine de participants venus de toute la région étaient répartis en trois groupes de niveaux : faux-débutant, moyen, supérieur, et ont travaillé sous la houlette des enseignants Mari-Roza Vilain, Josée Lafosse et Pascal Vilain. Ce fut l'occasion pour moi de rencontrer d'autres membres de la fédération Espéranto-Provence. Bien m'en a pris de participer à ce stage ! Le hasard a voulu que Pascal Vilain, qui guidait le niveau supérieur, nous propose un focus sur Georges Lagrange et Sergo Elgo, son avatar romancier. Pour moi, ce nom évoque d'abord et surtout l'amitié qu'il entretenait avec mon père, Michel Audibert, décédé il y a cinq ans, au travers de leur activité théâtrale. Pascal nous a proposé divers documents (chansons, extraits d'œuvres, photos...) de la vie de G. Lagrange. Il nous a fait écouter une pièce radiophonique dont le premier rôle est joué par mon père ! Ce fut une grande émotion pour moi d'entendre sa voix. Un grand merci à Pascal pour la qualité de sa proposition qui m'a permis, en plus de l'émotion suscitée, de progresser un peu plus en espéranto.

«Bonvolu dissemi amon, ĉar la mondo jam plenplenas je malamo kaj sufero.»



Tra "Var Matin", ni eksciis pri la forpaso de malnova esperantisto, **Gilbert Thomas** el *Draguignan*. Li estis entombigita en la familian tombon, apud la edzino, en *Vaucouleurs* (55) .

*Gilbert* komencis sian profesion karieron kiel instruisto en baza lernejo kaj finis ĝin kiel inspektoro !

Se Esperanto estis unu el liaj kromintereso, lia plej amata ĉevaleto estis radio. Kiel radio-amatoro, li aŭskultis hejme, ĉefe dum la nokto, mesaĝojn el aliaj partoj de la mondo. Kaj iam dumstaĝe, li prelegis pri tio kaj montris al la staĝanoj la centojn da kartoj, kiuj konfirmas la ricevon de la mesaĝoj.

Al liaj infanoj, *Espéranto-Provence* kondolencas. (R.T.)

Pri la vespero, ni petis la impresojn de unujara esperantisto el *La Ciotat*, *Patrick*, kiu ankaŭ unuafoje partoprenis Esperanto-aranĝon.

"Mi estas tre fiera, ĉar mi komprenis 95% ! Bone estas, ke la homoj el la diversaj kursoj havas komunan aranĝon. Estis mallongaj prelegoj pri diversaj temoj : *Jeanine* rakontis, kial ŝi ŝatas vojaĝi (ĉar ŝi konatiĝas kun homoj el malsamaj kulturoj, vidas, ke ili estas feliĉaj eĉ se ili havas malpli ol ni !) ; *Thierry* rakontis pri la 4 manieroj skribi la japanan lingvon (mi preferas la plej simplan, por skribi *Sony* !), *Renée* rakontis pri la skandalo de la ruĝaj ŝlimoj, kiuj el fabriko en *Gardanne* fluas al la maro, nun en la Nacian Naturan rezervejon !) *Pascal* rakontis, ke li estas eterna komencanto pri gitarludado kaj lernado de la Nerderlandanda lingvo, sed ne plu pri Esperanto, kio estas granda eraro, ĉar sekve oni petis multon de li en la Esperanta movado. Ni kune kantis kun *Josée* version de la franca himno, sed pri restoracio kaj manĝoj ; kaj kun *Jean-François* ni kantis kanone la kanzonon "Tohuvabohuo". Amuze !



" Esperanto- Aktiv' " est une lettre mensuelle gratuite éditée par les associations Espéranto-Jeunes et Espéranto-France, destinée à faire connaître les opportunités qu'offre la langue internationale Espéranto. Si vous n'êtes pas encore abonné à cette lettre, il vous est possible d'en faire la demande à cette adresse :

<http://esperanto-france.org/lettre-d-informations-esperanto-aktiv>

## Malgajiga novaĵo

*Intertempe, lia filo, ricevinte mesaĝon senditan al lia patro pri la U.K. en Lillo, sendis la jenan respondon :*

Bonjour,

Je suis Gérard Thomas, fils de Gilbert Thomas.

Je vous contacte, à sa place, depuis sa boîte mail, que je relève régulièrement depuis qu'il avait perdu la vue. Mon père est décédé le 17 novembre 2014, à l'âge de 93 ans, à Draguignan, peu de temps après ma mère, décédée le 30 septembre. [...]

C'était un espérantiste passionné, je ne me rappelle plus combien de fois il me faisait lire, en m'expliquant, le "vorto de la tago"...

Bien à vous, G.T.

La 10an de Novembro 2014 forpasis **Georgette Sauzade**, 92-jara, kiu aliĝis al la Kultura-Centro de Avinjonon komence de la 1990-jaroj kaj tuj iĝis diligenta kaj aktiva membro. Kun siaj Avinjonaj samklubanoj, ekzemple, ŝi fervore kunlaboradis en la organizo de ekskurstago en la departemento *Vaucluse*, okaze de la Montpeliera Universala Kongreso en 1998. *Espéranto-Provence* kondolencas ŝian familion.

### Pli gajige !

La 15an de Decembro 2014 eniris la Panteonon de la Fondaĵo « edukado.net » nia amikino **Monique Arnaud**.

Ĉiuj anoj de nia federacio tutkore gratulas ŝin !

Eblas legi pli prie sur Interreto, je la paĝo :

[www.edukado.net/biblioteko/panteono?iid=160](http://www.edukado.net/biblioteko/panteono?iid=160)

En la sama listo estas ankaŭ **Gaby Tréanton**, el la bretona regiono, verŝajne bone konata de multaj el vi, ĉar si jam partoprenis en la MES.

Niajn gratulojn ankaŭ al ŝi !



### El la mesaĝkesto de la legantaro

Kelkaj reagoj denove. Koran dankon al la kontribuintoj kaj ankaŭ al tiuj, kiuj same emos esprimiĝi post la ricevo kaj legado de sia gazeto. *(la redaktoro)*

**Pierre Oliva** : Kia mirinda laboro !

*respondo de la red. : Eĉ se tia aserto sendube estas troigita, mi devas konfesi, ke ĝi flatas mian egoon, Pierre, kaj pro tio vi estu dankenda !*

**Rose-Marie Quintin** : Mi ellernis la tutan gazeton. Tre interesa, dankon. Bona ideo de Monique : ne fari raporton, tio tiklas nian scivolemon ; ĉu pliaj informoj estas haveblaj rekte de Monique?

*respondo de la red. : Dankon pro viaj kuraĝigaj vortoj, Rose-Marie ! Mi esperas, ke intertempe vi ricevis de Monique la proponitajn dokumentojn. Ĉu aliaj petis ilin de ŝi ? (vidu en la n° 98 - p2, pri kio temas)*

**Philippe Combet** : Dankon, Pascal, pro la tre simpla, eleganta kaj klara traduko de "à l'ordre de" per "al". Mi aplaŭdas.

*respondo de la red. : Por ke ĉiuj legantoj povu kompreni pri kio temas, mi aldonas al ĉi tiuj simpatiaj vortoj viaj, Philippe, ke ili estas sekvo – kaj verŝajne konkludo – de diskuto estigita en la mesaĝkesto de la antaŭa numero de nia gazeto.*



Li skribis...

**François Cavanna**  
(1923 - 2014)  
écrivain, journaliste  
dessinateur humoristique  
en particulier  
pour Charlie Hebdo

*Vous ne voulez pas  
de l'Espéranto ?  
Vous aimez l'anglais.  
Bien fait pour vos querelles!*  
W. J. J. J.



### Pri la Panteono...

Estas jam la kvina jaro (2014), kiam en la naskiĝ-datreveno de edukado.net – kiu estas ankaŭ la Zamenhof-tago – ni enirigas en la Panteonon de instruistoj vivajn, meritplenajn kolegojn por ankaŭ tiel danki ilin pro ilia fervora agado sur la kampo de instruado de Esperanto aŭ pro iumaniera kontribuo al la disvastigo de la lingvo.

La ĉi-jaraj 16 premiitoj devenas el 11 diversaj landoj, el 3 kontinentoj.

*(info : edukado.net)*



## Paĝo de la komencantoj

### teksto en facila Esperanto

Komerca vojaĝisto venis ĉe kamparano kaj klopodis<sup>1</sup> vendi al li aŭtomobilon. Li faris ĉion eblan<sup>2</sup> por konvinki la kamparanon, ke li nepre bezonas<sup>3</sup> aŭtomobilon, sed la kamparano tute ne sentis la deziron posedi tian veturilon.

"Mi pli volonte uzos la monon por aĉeti bovinon, li diris.

- Sed per bovino vi ne povas iri al la urbo aŭ viziti viajn parencojn, respondis la komerca vojaĝisto.

- Tion mi scias, diris la kamparano, sed aŭtomobilon mi ne povas melki<sup>4</sup> !"

### klarigoj

1 - **klopodi** : Ĉu vi ne forgesis ? Vi jam havis klarigon por tiu vorto en la gazeto n° 96. > fari la necesajn penojn por atingi ion.

2 - **ebla** (el la sufikso ebl-) = *possible*

3 - **bezon-as/is** ? - komparu la francan kaj Esperanton :

*en français, au style direct :*

Il fit tout son possible pour persuader le paysan :  
"Vous **avez absolument besoin** d'une automobile."

*en français, au style indirect :*

Il fit tout son possible pour persuader le paysan qu'il **avait absolument besoin** d'une automobile.

Vous avez remarqué ? > changement de temps entre le style direct et le style indirect > passage du présent au passé.

*en espéranto, au style direct :*

Li faris ĉion eblan por konvinki la kamparanon :  
"Vi **nepre bezonas** aŭtomobilon."

*en espéranto, au style indirect :*

Li faris ĉion eblan por konvinki la kamparanon, ke li **nepre bezonas** aŭtomobilon.

Vous avez remarqué ? > pas de changement de temps entre les deux styles > les 2 verbes sont au présent, ce qui est beaucoup plus logique !

Mais ce qui cause de nombreuses erreurs dans les textes et conversations des espérantistes français, qui ont tendance à imiter le fonctionnement illogique de leur langue !

4 - **melki** = elpremi la lakton el la mamoj de bruto (ekz. melki bovinon, kaprinon... > *traire*)



### Plurelekta demandaro

*laŭ verkoj de Robert Llorens eldonitaj de Espéranto-Info*

#### 1 - gramatika

a) ..... ĝojo ni rigardas per niaj okuloj.

1 – kun ; 2 – per ; 3 – por

b) Las..... viajn fratojn ludi en la ĝardeno.

1 – as ; 2 – os ; 3 – u

c) Ne estas facil..... esti akurata.

1 – a ; 2 – o ; 3 – e

#### 2 – vorto-trezora

ĉ) elektu « akcento », « emfazo » aŭ « supersigno » por traduki la francan « accent »

1 – tonique : .....

2 – insistance : .....

3 – signe sur une lettre d'alphabet : .....

d) elektu « absolvi », « elpagi » aŭ « kvitanci » por traduki la francan « acquitter »

1 – en droit : .....

2 – une dette : .....

3 – donner quittance : .....

*(solvoj en la venonta gazeto)*



- Nu ! Kiom da vinboteloj restas en la kelo ?

- Dek du kiam mi malsupreniris, sed intertempe, kelkajn pliajn oni verŝajne liveris : nun ili estas dudek kvar !

